

VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského klubu v Mnichově Hradišti,
pro členy a příznivce mezinárodního jazyka.

Odpovědný redaktor: MUDr. Josef Hradil, 29501 Mnichovo Hradiště, Družstevní 1161 -

Cena: Dobrovolný příspěvek. Konto Česká spořitelna Ml.Boleslav 533650-188. -

Povolil OÚ Ml.Boleslav, odb.kultury čj.47/87-403/16. - Podávání novinových zásilek
povoleno oblastní správou pošt Střední Čechy v Praze, čj.P/Fiš 2295/92 ze dne 16.XI.1992

[illegible][illegible]

Kuraĝigaj adiaŭoj de la prezidanto de UEA John Wells. (povzbuzující slova na rozloučenou...) El
ESPERANTO 1/95. Mallongite.

La prezidanto de UEA laŭ iama saĝa decido de la asocia estraro (por eviti „personan kulton“) finos sian duan trijaran oficperiodon dum UKo (Universala Kongreso) en Tampere. En liaj vortoj sonas pritakso de la estintjara aktiveco de UEA kaj optimisma bondeziro por ĝia plua agado. Jen (zdejsou) vortoj de lia novjara proklamo:....: „Antaŭ ses jaroj, kiam mi transprenis la prezidadon de nia Asocio, ankoraŭ staris la Berlina Muro (zed’) kaj ankoraŭ ekzistis Sovetunio kaj unueca Jugoslavio. Kiaj konvulsioj (křeče) de post tiam trafis la landojn de Orienta Eŭropo kaj kun ili ankaŭ nian tiean (tamnější) movadon! Oni devis lerni novajn manierojn por vivi, novajn manierojn por organizi. Sed ni ja lernis kaj lernas. Ekzemple en Pollando la landa asocio ĵus renovigis sin en nova formo por la novaj cirkostancoj. En Rusio malaperis salutinde la skismo inter la du landaj asocioj: REA kaj REU unuiĝis sub la nomo Rusia Esperantista Unio. Tiuj eventoj ne restis seneĥaj (bez ozvěny) en Okcidenta Eŭropo. Aparte bonvena estis la decido de la nederlandaj esperantistoj, forbalai (zamést) la malnovan dividon inter la „socialista“ kaj la „neŭtrala“ (aŭ „burĝa“) movado, tiel kreante unuecan landan asocion, Esperanto Nederland. Ĉiu iom sperta esperantisto scias, ke ne sufiĉas, por ke ni gajnu la tutan mondon por Esperanto. La vojo estas longa. Ni devos labori por nia lingvo ankoraŭ dum multaj jaroj kaj jardekoj. Fervoraj (horliví) movadanoj (=anoj de la movado) foje (několikrát) seniluziĝis, ĉar ne ĉiu nia klopodo tuj portas fruktojn. Foje ni estis tro ambiciaj: foje ni devis rezigni pri klopodoj, kiuj montriĝis esti preter (mimo) nia kapablo. Tamen tio ne signifas, ke ni devas rezigni pri la agado de Esperanto. Ĝi restas unu el la belaj kaj noblaj idealoj de la homaro ...

Inter la apartaj problemoj de 1994 estis la suferoj de esperantistoj en Bosnio, Angolo kaj Ruando, pro la tieaj militoj. Per nia konto Espero ni faras, kion ni povas, sed ni povas malmulton. Ekonomia krizo ja alportis ankaŭ plurajn gravajn sukcesojn: - La 79a Universala Kongreso en Seulo estis granda sukceso: ne nur el organiza kaj financa vidpunkto, sed ĉefe pro la neeŭropeco de la partoprenantoj. Ili pruvis, ke ofte ili estas pli vervaj (náruživí) adeptoj de Esperanto ol la laciĝintaj (unavení) kaj konsumobseditaj (posedlí konsumem) okcidentanoj. - En Afriko ni notas rimerkindan

atingon en la formo de la kongreso en Tanzanio kaj la preparoj por la Tria Afrika Kongreso de Esperanto. - La mondkonata itala verkisto Umberto Eco, per sia libro „La ricerca della lingua perfetta“ („la serĉado de la perfekta lingvo“) pledas nedirekte sed persiste por nia afero. Tio valoras multoble pli ol niaj rektaj pledoj. - Grava evento estas ankaŭ la apero de „défi des langues“ (La defio (vǔzva) de la lingvoj) de Claude Piron, kaj „La lingua fantastica“ (itala antologio de E-sciencfiksaĵoj), ambaŭ ĉe nemovadaj eldonejoj. - Nobel-premio por ekonomiko estis aljuĝita al nia dumviva membro Reinhard Selten. En intervjuoj li ofte, spontane kaj nature, mencias sian esperantecon. - Post la problemoj trafintaj plurajn eŭropaj E-centrojn, kreiĝis novaj, espereble sukcesontaj centroj, en Kolombio kaj en Japanio. - Ne malplej grave: interne de UEA ni sukcesis akuratiĝi la aperritmon de la periodaĵoj kaj stabiligi la financon de la Asocio.

Tiuj sukcesoj eble ne estas spektaklaj. Sed spektaklaj sukcesoj okazas nur en vetludejoj kaj brosoj, kaj tiaj sukcesoj povas malaperi same spektakle, kiel ili venis. Tamen niaj propraj atingoj, eĉ se ili ne estas epokfaraj, kapablas nutri iom da freŝa kuraĝo. Ni ne timu preni tiun kuraĝon por daŭrigi nian agadon kaj batalon. Ni konsciu, ke ni laboras por pli justa mondo, por egalrajteco kaj digno sur la kampo de la internacia komunikado. Ni ne malesperu pro la foro de nia celo, ĉar ĝi ne estas, bedaŭrinde, pli proksima ankaŭ sur la aliaj kampoj de la homa aktivado. Ne eblas sukcesi pri Esperanto, antaŭ ol sukcesi pri la monda paco, antaŭ ol venki la malsaton kaj elimini gravajn malsanojn. Sed eblas labori por tiuj celoj. Belan okazon donas al ni tiurilate la 50-a datreveno de Unuiĝintaj Nacioj en 1995. Ni festos ĝin i.a. per modela asembleo en la kadro de la 80-a Universala Kongreso en Tampere. Ni do laboru fidele kaj konstante por nia idealo. Kiu scias, kiaj novaj sukcesoj atendas nin? Ni havu kuraĝon, ke kelkajn el ili portos por ni ankaŭ la jaro 1995“.

Esperanta proverbaro (přisloví). Eltiraĵo el „Kompara frazeologio de M.F.Zamenhof. Tradukis L.L. Zamenhof.“

Granda nubo, granda pluvo. - Mizero instruas. - Ŝerce dirite – cele pensite. - Fremda mizero – ridinda afero. - Kia sono – tia resonado. - Kia semo, tia rikolto. - Kiu ne akiras, kiam li povas, tiu poste deziras, sed jam ne retrovas. - Kun kiu vi kuniĝas, tia vi fariĝas. - Komenco bona, laboro duona. - Unua paŝo ion direktas. - Tro da konfido kondukas al perfido. - Ju pli da babilado, des pli da pekado. Post brua vento, subita silento. - Per insulto kaj kolero ne klariĝas afero. - Pri lando malproksima estas facile mensogi. Kontraŭ faro farita ne helpas medito. - Sorto ofte alsendas kion oni ne atendas. - Eĉ inter piuloj ne mankas pekuloj. - Al feliĉuloj eĉ koko donas ovojn. - Kio pasis, ne revenos. - Juneco ne scias, maljuneco ne povas. - Malriĉulo parencojn ne havas. - Ne demandu scienculojn, demandu spertulojn. - Malpli esperu, pli konsideru. - Kiu nenion valoras, plej multe sin gloras. - Rado malbona knaras plej multe. - Ne timu hundon bojantan, timu hundon silentan. - Ne veku malfeliĉon kiam ĝi dormas. - Ni amu nin frate, sed ni kalkulu akurate. Nur tiu ne eraras, kiu nenion faras. - Groŝo ŝparita neniam perdiĝos. - Neniu scias, kio morgaŭ lin trafos. - Tro elektema nenion ricevas. - Ĉiu havas sian propran guston. - Ĉiu havas sian veron – Kiu mizeron ne havis, mizeron ne konas. - Nur suferinto ŝatas feliĉon. - Se la sorto vin batas, mokantoj ne mankas. - Kiun la sorto karesas, al tiu ĉio sukcesas. - Kiu multe babilas, pensas malmulte. - Barelo malplena sonas plej laŭte. - Bono farita ne estas perdita. - Malfeliĉo malofte venas sole. - Kion jaroj ne donis, ofta minuto alportas. - Guteto malgranda, sed ŝtonon ĝi boras. - En landoj transmaraj estas oraj arbaroj.

- Koro tre plena – Buŝo parolas. - Fidanta al vorto atendas ĝis morto. - Espero kaj pacienco kondukas al potenco. - Metio lacigas, metio vivigas. - Lernu juna, vi scios maljuna. - Kiu regalas per ŝtonoj, tiun oni dankas per bastonoj. - Kie regas virino, malbona estas la fino. - Al hundo bastono, al homo leciono. - Ofta festo, malplena kesto. - Se forestas la suno, sufiĉas la luno. Riĉigas ne enspezo, sed prudenta elspezo. - Tablon ornamas ne tuko sed kuko. - Ni forgesas averton, ni memoras la sperton. - Batanto povas argumenti, batato devas silenti. - Du militas, tria profitas. - Pli valoras propra ĉemizo, ol fremda plena valizo. - Neestas piediranto kolego al rajdanto. - Homo pafas, Dio trafas. - Granda telero, malgranda kulero. - Ne timu tranĉilon, timu babilojn. - Ju pli da honoro, des pli da laboro. - Al papero ne mankas tolero. - Forveturis malsaĝa, revenis nur pli aĝa. - Mizero faras viziton, ne atendente inviton.

Novaj eldonoj de nia asocio: 25 jaroj de ĈEA, 1969-1994. Historio + dokumentoj. 32 Kĉ.

Milito kontraŭ salamandroj. K.Čapek. Tradukis J. Vondroušek. 95 Kĉ.

Ne nur soldato Ŝvejk. Elekto el kelkaj rakontoj de Hašek kaj montraĵo el Ŝvejk en traduko de kelkaj konataj tradukistoj. 126 Kĉ.

UKo 1996 en Prago proksimiĝas kaj estas konvene citi, priskribi faman entuziasmon kaj atmosferon de la UKo 1921 kiu ankaŭ okazis en Prago. S-ano Mařík sendis al ni citaĵon el la libro de la fama esperantisto Dro Edmont Privat: (p.103-104, Historio de la lingvo Esperanto). D-ro Beneš tie (dum solena vespermanĝo) kaj per publika letero deklaris: „Mi certigas vin, ke ideon pri Esperanto mi ĉiufoje subtenados.“ Ankaŭ D-ro Nitobé laŭdis la „Internan ideon“ de la movado, tiom necesan por rekonstrui pacan homaron. Tuta Mezeŭropo tiun ĉi fojon aŭdis pri Esperanto dum la somero, ĉar vojaĝis ne nur la kongresanoj, sed iliaj familianoj kaj miloj da ceteraj partoprenantoj de antaŭfestoj aŭ postaj konvenoj en Berlin, Dresden, Wien, Budapest, Graz, Trento, Reichenberg (Liberec). Urbojn kaj staciojn trapasis dekoj da internaciaj karavanoj, parolante Esperanton. Neniam antaŭe la sono de la lingvo tiom aŭdiĝis en la stratoj, en stacidomoj, en vagonoj. Ĉie pendis flagoj, ĉie brilis steletoj, la landlimoj sindone deĵoris UEA-delegitoj kun verda brakbando. Eĉ fervojistoj respondis en Esperanto. En multaj vilaĝoj ĉeĥoslovakaj, hungaraj, aŭstriaĵoj amasiĝis lokaj anaroj por bonvenigi eksterlandanojn. Sub somera suno flamis ruĝaj ŝaloj de kamparaninoj, flue babilantaj en lingvo Zamenhofa. Oni demandis, oni rakontadis, oni kantis la himnon, oni svingis salutojn al pasantaj vagonaroj. Kia bela paca revenĝo je la ŝiraj (rvoucí) forveturoj de soldatoj dum la milito! Interfratiĝo redonis al koroj esperon kaj ĝojon. Venos pli bonaj tempoj. „Iam la homoj ĉesos esti lupoj unu kontraŭ aliaj,“ profetis Zamenhof. En ĉiuj gazetoj de Centra Eŭropo aperis artikoloj mirantaj pri la granda nombro da esperantistoj. La impresoj estis vere forta kaj neatendita. Esperanto retrovis vivantan popolon. En Praha estis decidite, ke la organiza komisiono devos aŭdi kritikojn kaj proponojn pri la plano kaj publikigi detalan tekston de statuo en Aprilo 1992, por ke ĉiuj esperantistoj havu la tempon fari al si opinion antaŭ la sekvanta kongreso ... Fine okazis longa diskuto pri enkonduko de Esperanto en lernejojn kaj plej bonaj rimedoj ĝin akceli. Dum la tuta kongreso en Prago regis neordinara entuziasmo kaj optimismo. Oni ja sentis, ke la tuta movado efektive revekiĝis kaj reprenis sian marŝadon antaŭen.“

aperas dusemajne *Eventoj* Internacia Sendependa Gazeto pri la Esperanto-Movado ekde marto 1992
Redakcia adreso Budapeŝto, pk. 87. H-1675, Hungario Telefon kaj telefakso (+36-1) 288-258
la populara E-magazino dusemajna perdis kontakton kun Ĉeĥio ne havante peranton por nia lando. Eble kaŭzis tion la nova prezo, kiu estas por plimulto da niaj anoj neatingebla. Tamen la freŝadataj informoj mankos por nia anaro. Ĉu iu el vi ne havas kuraĝon peri la magazenon? Estas sekvaj ebloj de perado: kolekti abonprezon egalan al 32 germanaj markoj (24 dol, 2500 forintoj) kaj sendi al Budapeŝto per kiu ajn maniero (en markoj), aŭ al la konto de Eventoj ĉe UEA ELLS-S, aŭ prizorgi regionan multobligadon en nia ŝtato kaj dissendon. Eventoj rajtigos vin tion fari sendante prespretan originalon. Ĉu iu kuraĝos?

Kune al 80a jubilea UKo en Tampere! Nia asocia ekspedicio zorgos anstataŭ vi pri aviadila bileto, 3 tranoktoj en hotelo Akademia en Helsinko kaj 7 tranoktojn en Tampere en trilitaj ĉambroj kun matenmanĝoj. 14.880 Kč. Kongreskotizon oni devas pagi aparte. Partopreno en kongresaj ekskursoj per aŭtobuso 2.100 Kč. Forflugo 21.7. antaŭtagmeze, alflugo 31an posttagmeze. Informoj Květa Hubnová, Osadní, 17000 Praha 7 telefono (02)803608. Aliĝtermino 31.V.95.

Tenu la elsendojn de Radio Varsovio viva! (Pola radio, E-redakcio, box 46 PL 00-950 Varsovio sendos al vi programon kaj cirkuleron: Parolas Varsovio en Esperanto). Elsendado limigita al mallongondoj, tamen kvalita.

INTERLIGILO, organo de Internacia poŝtista kaj telekomunikista E-asocio aperas 4x jare, abonkotizo 55 Kč, peranto V.Hasala, p.s.34, 69662 Strážnice. Samloke vi povas aboni gazeto EL POPOLA ĈINIO monatan (430 Kč jare aŭ provnumeron kontraŭ 30 Kč) kaj liston da perantoj de AMIKECA RETO de SAT, kiuj helpas dum via vojaĝado eksterlanden. MONATO kostas 405 Kč jare.

Renkontiĝoj 9-a Ĉeĥa-Saksa tago en Ústí nL okazis la 17-an de decembro 1994. Partoprenis en ĝi pli ol 40 ĉeestantoj /inter ili 10 el Germanio/. Prelegan matineon gvidis novelektita rektoro de la universitato en Ústí s-ano prof. Dro Novobilský. Prelegis Eva Seemanová pri Rudolf Hromada, Krištof Jaroslav Mařík pri evoluo de E-o en nia lando, prezidanto de ĈEA ing. Vlastimil Kočvara pri aktuala stato de nia Asocio, D-ro Chrdle pri entreprenado lige kun E-o kaj Miroslav Smyčka prezentis prelegon de Jaroslav Mráz pri Krištof Harant el Poljice kaj Bezručice. Post la komuna tagmanĝo okazis koncerto omaĝe al naskiĝdatreveno de la kreinto de E-o kaj samtempe al la 90-jariĝo de ĉeestanta honora membro de UEA kaj ĈEA Josef Vondroušek. Eva Seemanová recitis poemojn kaj deklamis unu el Apokrifoj de Karel Čapek, esperantigitaj de J.Vondroušek. Kun la pianakompano de Jan Zimmer violonis Jan Duda, klarnetis Bohuslava Šrutová kaj kantis Dagmar Parohová, Tomáš Fiala kaj Miroslav Smyčka. La koncerton malfermis jam tradicie juneta violistino Zuzanka Urbanová kaj vorte ĝis enkondukis kaj fermis Vlastimil Novobilský. Post la koncerto okazis societa vespero kun komuna kantado kaj ludado de kristnaskaj kantoj, magiaĵoj de Václav Vano-filo, vintrinkado kaj frandado de kristnaskaj sukerbakaĵoj. Oni tostis (připíjeli) al J. Vondroušek kaj J. Mařík, honoraj prezidantoj de E-klubo en Ústí kaj adiaŭis kun komunaj kristnaskaj kaj novjaraj bondeziroj.

Lančov 1995: 14-tagaj kursoj de Esperanto, germana, angla kaj franca lingvoj en tri periodoj el de 2.VII. Ĝis 12.VIII.95, plenaĝaj 2280 Kč, anoj de ĈEA 2080 Kč. Loĝado en 3-5litaj kabanoj, manĝado 5x tag, 4h instruado.

ESPERANTO-regiona asocio, 05801 Poprad, Sobotské nám. 36, tel 092/32419: Printempa E-renkontiĝo en Altaj Tatroj 5.-7.V., 434 Kč+100 Poprad.

Internacia seminario por vendistoj-E 2.-4.VI., 434.-+100

Somera E-lernejo Poprad 4.-18.VIII., 2.821.-+400.-SK

Turisma semajno Poprad 18.-25.VIII. 2387.-+150 Sk
Mikologia seminario Poprad 8.-12.IX. 868.-+120 Sk
Kulturaj E-tagoj Poprad 17.-19.XI. 434.-+100 Sk
Renkontiĝo okaze St Nikolas Zakopane (Pollando) 1.-3.12. 862.-+100 Sk
Ukraina-ekskurso al Karpati en majo 4 tagoj 1100 Sk
Nyíregyháza 3 taga renkontiĝo kun Esp-istoj, banejo SOSTO, Tokai 800 Sk
Propono de aŭtobusaj ekskursoj: a) Italio (Roma Vatikano, Venecio). - b) Bulgario – Burgas -apudmara restado. - c) Grekio (Thesaloniko, Atheno). Detalajn informojn petu ĉe la menciita adreso en Poprad.
Printempa fervojista renkontiĝo Kunčice pod Ondřejníkem 21.-23.4. Informoj Jindřich Tomášek, 75118 Říkovice 33
Internacia renkontiĝo de naturamikoj-esperantistoj Pláně pod Ještědem 19.-21.V. Informoj Miloslav Jíra, Mechová 8-32, 46604 Jablonec nN.
48a kongreso de internacia Katolika unuiĝo Esperanta Olomouc 8.-15.VII. Informoj Miloslav Šváček, Tršická 6, 75127 Penčice.
29a konferenco de Fervojista sekcio 25.-27.8. Č.Třebová. Informoj J.Tomášek, 75118 Říkovice
8a Esperanto-tago 23.IX. Pardubice Klub esperantistů Dr Schulhof, inf. J. Rýznarová, 53003 Pardubice, Na okrouhlíku 21.
8-a Internacia kultura festivalo Ústí nL 29.9.-1.10.95 kaj Ĉeĥa-saksa Tago Ústí nL 9.XII. Inf. Ing. J. Kříž, Družstevní 411/11, 40007 Ústí nL.
Internacia festivalo „Filmo kaj video en Esperanto“ Brno, organizas kaj informas Kava-Pech Dobřichovice. (14.-19.X.)
Konferenco de ĈEA en Brno 20-22.X. Informoj Věra Podhradská, Poříčí 1, 60300 Brno.
7-a Alp-Adria E-Konferenco 21.-23.IV.Szombathely, Hungario. Inr.: D-ro Judit HorváthWesselényi u.2/cII.2, HU-9700 Szombathely.
20-aj Esperanto Tagoj de Bydgoszcz 28.IV.-3.V. Pollando Esperantotur ul.M.Sklodowskiej-Curie 10, PL 85-094.
TEJO- junulara seminario Budapeŝto – inf. Nóra Csoszár, Erdődy Pálffy T. u.25 HU-8100 Várpalota 29.IV.-7.V.
„Vieno alimaniere“, naturamikoj, Aŭstrio, organizas Erna Löring, Pf 225, CH-4003 Basel, Svislando. 6.-14.V.
Simpozio pri entreprenado pere de E-o, Dobřichovice, Anglická 878, CZ 25229, 10.-14.V.
17a Ĉebalte E-ista Printempo, Mielno Pollando (inf. PEA, Filio en Koszalin pk 30, PL 75-016 Koszalin) 12.-18.VI.
Internacia konferenco pri turismo kaj medioprotektado, Budapeŝto 1.-7.julio (Hungara EA, Pf 193 Budapeŝto, HU 1368)
E-lingvolernado por ĉiuj generacioj, Százhalombata (Movilo, Nyirpalota ut 107 HU 1157 Budapeŝto) 1.-7.VII.
31-aj Baltiaj E-tagoj 8.-16.VII., Girionys, Litovio (Litovia EA ab.k. 167, LT-3000 Kaunas)
Somera E.ista Familia/Feria Tendaro 29.VII.-6.VIII. Thomsdorf, Germanio Werner Pfennig, Uns Hüsung 29/1104 DE 17034 Neubrandenburg.
Beskidmontara Turisma Renkontiĝo 2.-8.VIII. Szczyrk, Pollando (novtur, Str.Włokniarzy 22, P.O.K.30, PL-34-120 Andrychow
Junio-Aŭgusto Someraj kursoj, Grésillon, Francio 49150 Baugé, Kastelo
9-a Internacia kaj 3a mezeŭropa Junulara Seminario, Tata, Hungario (inf. Edit, Lindwurm, Lajtha u. IX/56, HU 1203 Budapest. 8.-14.VIII.
Lingvokurso ĉe la lago Balaton 9.-16.VIII., (Esperantotur, Andrasy ut 27, HU 1061 Budapeŝt.
17a renkontiĝo de esperantaj familioj, 10.-16.VIII. Tatabanva Hungario, inf: ILEI pf 193, HU 1368 Budapest.
Internacia renkontiĝo de naturprotektantoj 15.-21.VIII. Hortobágy, Hungario (Inf Movilo Nyirpalota ut 107, HU 1157 Budapeŝto).
15a Somera Universitata sesio, San-Marino. (inf.Sekretariejo de AIS, Kleiberger Weg 16b, DE 33100 Paderborn).

21-a Internacia E-semajno. Sète, Francio 2.-.IX., Drino Yvete Vierende, 5 Rue de Dro Roux, FR 34000 Montpellier

11-a Ĉedanuba Renkontiĝo Nové Zámky, Slovakio (prof. Ernő Geleta, Nám. Republiky 2/11 SK 94065 16.IX.95

1-a Internacia scienca Konferenco pri Trafikfakultato de Universitato en Pardubice 19.-21.X. Str. Studentská, CZ 530096

6-a Montkabana renkontiĝo, Aigen im Ennstahl, Aŭstrio – organizas junularo esperantista Aŭstrio, Pf. 804 AT-8011 Graz, 5.-8.X.95

Detaloj por Turisma renkontiĝo en Pláně p.Ješt. Organizantoj akceptas aliĝon ĝis 30.4.95. Turisma programo, vesperaj diskutoj kaj projekciado de dokumento pri naturo. Manĝado prok 100 Kč potage por enlandanoj 60-80 Kč, eksterlandanoj 120-140 Kč.

Uzu prave prepozicionjn!

Používejte správně předložky!

EL :

1) movo de io eksteren: forpeli iun el la domo; flago pendis el la fenestro; tiri el kesto; li ŝtelis juvelojn el la trezorejo; letero sendita el tre malproksime; la steloj eklumis el klara etero; el sub la kanapo kuris muso sub la ŝrankon;

2) prepozicio montranta al antaŭan staton de io, kio ŝanĝiĝis: veki el dormo; ekŝiĝi el la servo; ili forĝos el iliaj glavoj plugilojn; levi sin el mizera situacio;

3) la abstraktan metaforan originon: rakonto el la biblio; vortoj el la Fundamento; li tion desegnis el la memoro; mi donos kelkprocentan profiton el la vendado;

4) la kaŭzon de sento aŭ ideo: mi ne scias el kia kaŭzo...; fari ion el (pro) simpla kaprico; el amo, el ĝojo, el principo;

5) la aron kies erojn oni deprenas aŭ abstraktas: kelkaj el la ĉefoj, restis iom el la viando; tio estas la lastaĵo el nia posedo; ŝi kantas plej bone el ĉiuj;

6) la materialo, kiu konsistigas ion: statuo el marmoro; mantelo el veluro; haremo el dek virinoj; nia urbo havas pasintecon el gloro; la verko konsistas el kvin partoj.

EL uzata kiel vortero memstare: (en senco de 1) vidu supre) elĉ: ĵeti ion elen; la pluva akvo verŝiĝis en ŝiajn kaj elen. - eligi: violinoj eligas belajn tonojn; li eligis sufokitan ĝemon; ili eligis lin rapide el la malliberejo; li estis eligita el la listo de patroj; eliĝi: ili rapide eliĝis el la ĉambro

Prefikso montranta:

1) direkton: elveturi el la garaĝo; eltiri karbon el minejo; elpreni; eltranĉi; elĉizigi el la roko loĝejon por si; eldoni libron; eldiri koran saluton; elparoli (prononci); elpaŝi.

2) ĝisfinan plenumon de ago; eltrinki botelon da vino; ellerni (tute plene lerni); ellabori (labori ĝis perfekteco); elkreski; elbruli; elteni; elbaki; En tiu senco oni povas iam anstataŭi per prefikso sat-: satmanĝi; tut-: tutkore mi salutas.

3) Ricevon, akiron (dosažení) de io per la ago, montrita de la radiko: elpeti (ricevi per petoj); elflati; elalmozi (vyžebrať) panon; elaŭdi iun (plenumi lian peton); elpensi; eltrovi; sin elturni (serĉi eliron el malfacila situacio); elkalkuli (ricevi rezulton per kalkulo).

Kiel diri? Praktika esperanta frazeologio de LENTAIGNE:

KORPO (daŭrigo – pokračování): DORSO, FLANKO, TRUNKO:

Draŝi (mlátit) al iu la dorson. Fali dorsen. Eksenti froston en la dorso. Fari ion malantaŭ la dorso de iu. Ataki iun dorse (de poste). Mortigi iun de post la dorso. Malestime turni la dorson al iu. -

FLANKO: flanko ĉe flanko (bok po boku). Stari ĉe la flanko de iu. Turni sin aliflanken. Konsideri ion laŭ ties plej bona flanko. -

TRUNKO: Kapti iun ĉirkaŭ la korpo. Tiel malgrase, ke liaj ripoj estas kalkuleblaj. Malgrasa kiel skeleto, kiel balailtenilo. Esti maldika ĉe la koksoj. Kava brusto de la maljunulo. La brusta perimetro. Brusta inflamo, tuso. Arkigi la verterbraron. Kurba dorso (ohnutá záda). Busto. Torso. Sino (klín). -